

Ludwig Pickel

85 NURNBERG 1, Postfach 2113

Esperanto-Nachrichten-
Dienst (END) Pilo-Press



Europa Esperanto-Revuo
Libroservo - Eldonejo

Cirkulera letero al la amikoj de "Esperanto Nürnberg"

Januaro 1976

Jara raporto 1975

Estas kutimo, post paso de jaro fari retrorigardon kaj fari bilancon.

Sen troigo mi povas konstati, ke tiu bilanco estas pozitiva. Ankaŭ dum 1975 mi informis milojn da homoj pri **Esp-o**, instigis centojn lerni la lingvon kaj kreis kelkdekonojn de novaj esperantistoj. Sen-dube "Esperanto Nürnberg" fariĝis unu el la plej gravaj Esperanto-Centroj en FRG.

La informado okazis laŭ jenaj kanaloj:

- 1) Rekta informado per la poŝto. Centoj da interesuloj petis informojn kaj ricevis ampleksan materialon.
- 2) Informado per gazetara servo END kaj Pilo-Press. Informojn el tiuj informiloj publikigis en- kaj eksterlandaj gazetoj, parte ankaŭ radio-stacioj. Bavara Televido prezentis en la vespera informservo okulfrape la unuan numeron de "Europa Esperanto-Revuo" en marto 1975. En la gazeto "Nürnberger Zeitung" aperis ampleksa intervjuo kun mi kaj mia por-Esperanta laboro kun foto.
- 3) Informado al oficialaj instancoj en Bonn kaj aliaj.
- 4) Informado per ekspozicioj. Elstaras la Esperanto-stando ĉe la eŭropa lernila foiro en Nürnberg "Didacta", kie miloj da homoj povis informiĝi pri Esperanto kaj speciale pri Esperanto-lerniloj. Menciindas ankaŭ la ekspozicio en München kunlabore kun la Esperantoklubo München. Aliaj ekspozicioj okazis en Oberkirch, Augsburg, Nürnberg, Stuttgart, Treuchtlingen, Weissenburg k.a.
- 5) Informado per disdono de varbiloj kaj informiloj. Aperis nova varbilo "Internationale Sprache Esperanto".
- 6) Informado per kulturaj aranĝoj kaj "Tagoj de malfermaj pordoj". La plej grava evento estis la turneo de la Pola Esperanto-Teatro, kiun mi aranĝis dum majo kaj junio. Okazis prezentoj en Oberkirch, Nürnberg, Augsburg, München, Stuttgart, Bonn kaj Paderborn. Aperis favoraj recenzoj en gazetoj, speciale en Nürnberg.
- 7) Speciala kampanjo "Esperanto en Bavario".

Dum 1975 eniris pli ol 2000 poŝtaĵoj, eliris miloj da korespondadoj kaj presadoj.

Instruado. Al informado devas sekvi instruado. En la popolaltiernejo de Nürnberg okazas de jaroj Esperantokurso; kadre de la Esperanto-grupo mi gvidas konversacian kurson.

Mia libroservo vendis ĉ. 600 lernolibrojn; kelkcent da interesuloj eklernis Esperanton. Kun ili mi daŭrigas la kontakton per regula alsendo de informiloj.

Varbado. Mi sukcesis varbi novajn abonantojn al Europa Esperanto-Revuo kaj kelkajn membrojn por GEA. Malnovaj esperantistoj pere de mi retrovis kontakton kun Esperanto.

Eldonaĵoj. Aperis 7 numeroj de Eŭropa Esperanto-Revuo; n-ro 8/75 aperos dum januaro 1976. Estas ĉefe mia merito - malgraŭ ĉiu kritiko de diversaj flankoj - ke en FRG hodiaŭ ankoraŭ aperadas presita revuo kiel Eŭropa Esperanto-Revuo (antaŭe Germana Esperanto-Revuo). Necesas multe da idealismo kaj investo de mono.

Se Esperanto estonte volas kaj povas plenumi la pretendon esti lingvo vivanta necesas Esperanto-Revuoj belaspektaj kaj bonkvalitaj, ne nur bultenoj kaj cirkuleroj. Ne estas dubo, ke Eŭropa Esperanto-Revuo ludis kaj ludos gravan rolon.

Pilo-Press kaj END. Aperis dum 1975 46 numeroj 4-paĝaj de Pilo-Press, la sola ĉiusemajna periodaĵo en Esperanto, kiu dum sia 5-jara ekzistado fariĝis unu el la plej aktualaj kaj prestiĝaj informiloj. Pilo-Press multe kontribuis al la popularigo de la Esperanto-elsendoj. Aliflanke la Esperanto-redakcioj de la radio-stacioj parte regule utiligas la informojn de PP. Pola Radio eĉ havas apartan rubrikon sub la nomo "Novaĵoj de Pilo-Press".

De la germanlingva eldono aperis 13 numeroj. Ankaŭ Esperanto-Nachrichten-Dienst (END) ĝuas bonan prestiĝon kaj fariĝis konata ankaŭ ĉe la germanlingvaj amasmedioj.

Libroservo

Ĉiutage estas ekspedataj Esperantolibroj per la poŝto al mendintoj. Ankaŭ dum ekspozicioj estas vendataj libroj kaj aliaj esperantaĵoj. La ekonomia krizo iomete negative influis la vendadon de Esperantoliteraturo.

Speciala problemon sur la Esperanto-libromerkato prezentas mendoj de librovendejoj. Ĉ. 100 librovendejoj el FRG, Svislando kaj Aŭstrio, unu el Luksemburgio mendis librolistojn respektive mendis librojn, ĉefe lernilojn. Tiaj mendoj kaŭzis al mi perdon de enspezoj, parte deficiton ĉe certaj libroj.

Kvankam estus dezirinde, ke en ĉiuj librovendejoj estu Esperantolibroj por aĉeti, tamen necesas konstati, ke la Esperanto-libromerkato ne jam estas matura por tio.

Grava problemo por Germanlingvio estas la manko de novaj Esperantolerniloj modernaj. Necesas kolekti grandan kapitalon por re-eldoni speciale Esperanto-vortarojn. Feliĉe pasintjare re-aperis la vortaroj Esperante-Deutsch kaj Deutsch-Esperanto de Krause ĉe VEB Enzyklopädie Leipzig, GDR.

Rehaveblas en mia eldono la libro "El la vivo de netaŭgulo" de Eichendorff. Disponeblas stoko de la lernolibro "Esperanto einmal anders" de William Auld.

Financoj. Tia ampleksa plenprofesia agado postulas investon de multe da mono kaj mian tutan laborforton ĉiutage.

Jen mi publikigas kelkajn nombrojn pri elspezoj:

Eŭropa Esperanto-Revuo	24 000 GM
Pilo-Press kaj END	2 000 GM
Afranko	9 200 GM
Ekspozicio DIDACTA	2 000 GM
Teatra Turneo	2 500 GM
Informiloj, varbiloj	2 000 GM
Vojaĝelspezoj	3 000 GM

La ĉi-suprajn elspezojn kaj la necesan monon por mia vivtenado mi devas pergajni per mia persona laboro por Esperanto; tio kompreneble ĉiam kaŭzas gravajn financajn problemojn.

La ĉefa enspezofonto estas la abonoj al miaj periodaĵoj, la vendoj de mia libroservo kaj aliaj servoj.

Germana Esperanto-Asocio pagis la abonkotizon al Eŭropa Esperanto-Revuo por siaj membroj sume de 12 520 GM, subvenciis la ekspozicion DIDACTA per 600 GM, la turneon de Pola Esperanto-Teatro per 600 GM, la gazetaran servon per 500 GM kaj la ĝeneralan informadon per 400 GM. Por eviti miskomprenon mi volas konstati, ke "Esperanto Nürnberg" ne estas organo aŭ institucio de Germana Esperanto-Asocio, sed memstara, sendependa entrepreno, kiu kunlaboras kun ĉiuj agantaj Esperanto-fortoj, sed kiu financigas sian agadon mem.

Kelkaj esperantistoj per mondonacoj subtenis mian agadon. Al ili mi esprimas mian koran dankon kaj petas ankaŭ estonte daŭrigi tiun mondonacatan helpon!

Ci-loke mi volas ankaŭ danki al f-ino Gunda Hofmann kaj s-ino Otilie Schmitt, Nürnberg, kiuj per sia daŭra volontula laboro sen iu ajn rekompenco, ja eĉ kun propraj materiaj oferoj dum jaroj kunhelpas, ke mi povu plenumi mian por la disvastigo de Esperanto gravan agadon - cetere la sola profesia agado por Esperanto en FRG.

Depost 1963 mi nun profesie laboras por Esperanto - kelkfoje sub malfacilaj cirkonstancoj. Estas mia firma intenco daŭrigi tiun agadon ankaŭ en 1976 kaj en la venontaj dek jaroj.

Mi volas pliampleksigi la instruadon de Esperanto per koresponda kurso, pliefikigi la informadon, speciale per la gazetara servo kaj per ekspozicioj. Kunlabore kun la Esperantogrupo Augsburg mi preparas grandan Esperanto-Ekspozicion, kiu okazos de la 24-a de aprilo ĝis la 9-a de majo 1976 sub la honora protekto de la ĉefurbestro de Augsburg, Hans Breuer, en "Unterer Fletz" de la urbodomo en Augsburg. La oficiala malfermo estos la 24-an de aprilo 1976, je la 11-a horo, en "Oberer Fletz" de la urbodomo.

Mi jam nun invitas vin viziti tiun ekspozicion, kiu fariĝos kulmina manifestacio de Esperanto 1976 en FRG. Loka organizanto de la ekspozicio estas Hermann Schmid, Alte Reichsstrasse 31 f, 8901 Steppach, kiu samtempe preparas kadran kulturalan programon, ekz. Kulturalan vesperon, Bavaran ligo-tagon k.a. Do valoras la vizito de Augsburg.

"Esperanto Nürnberg" fariĝis konata ne nur en FRG. Ĝi havas amikojn ankaŭ en eksterlando. Mi invitas vin fariĝi aŭ resti ankaŭ estonte "amiko de Esperanto Nürnberg" kaj subteni ties agadon, per abono de END, Pilo-Press, Eŭropa Esperanto-Revuo, per mendoj de libroj kaj per mondonacoj. Ankaŭ mi kiel multaj aliaj Esperanto-institucioj dependas de mondonacoj, ĉar multaj servoj, kiel informado, ne donas ĉiam enspezojn, kaj necesas plivastigi tiun informadon sur ĉiuj niveloj.

En la lastaj numeroj de Pilo-Press mi publikigis spertojn de Esperanto-agantoj pri informado kaj instruado. Kelkaj tiuj spertoj estis pesimismaj kaj montris la malfacilecon sukcese informi kaj instrui Esperanton.

Mi ne estas pesimisto, kun optimismo mi eniras la jaron 1976 kaj la venontajn dek jarojn. Por via helpo kaj subteno mi antaŭdankas!

Kun sinceraĵ salutoj

Ludwig Pickel
Via LUDWIG PICKEL

Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Tel. 463649

Postscheckkonto Nürnberg 819 56-851

Stadtparkasse Nürnberg 1.901.579

Bayerische Vereinsbank Nürnberg 5.606.489

Esperantist Pickel will Völkerverständigung

Da kimmt der Preiß mit Bayern zsamm

Nürnberger gibt „Revuo“ und „Pilo-Press“ in Esperanto heraus — Sie werden in aller Welt gelesen

„Estimata amiko“ (geschätzter Freund) schrieb K-do Gong aus Peking an Ludwig Pickel aus der Glockenhofstraße, und teilte mit, daß er die „Esperanto-Revuo“ künftig mit Nachrichten aus der Volksrepublik China versorgen werde. Berufs-Esperantist (der einzige in der Bundesrepublik) Ludwig Pickel freute sich nicht nur über die Bereicherung der von ihm seit Januar 75 herausgegebenen „Revuo“, sondern auch über das kleine Stückchen Völkerverständigung, das jeder Kontakt mit sich bringt.

Denn: „Esperanto hat nichts mit Vereinsmeierei zu tun und ist auch keine Sekte, wie manche Leute annehmen. Esperanto hat zum Ziel, eine neutrale Weltsprache zu werden, in der jeder mit jedem reden kann.“ Freilich weiß Pickel, daß dieses Ziel noch ziemlich weit entfernt ist. „Aber vielleicht kann erreicht werden, daß innerhalb der Europäischen Wirtschaftsgemeinschaft Esperanto für die Behörden und für die Leute auf der Straße ein Verständigungsmittel wird!“ Diese Regelung wäre frei von Emotionen, so meint Pickel, keine „echte“ Sprache würde vorherrschen, jedem Sprachentritt (Beispiel Flamen und Walonen) bliebe die Luft weg.


Besonders liegt Pickel die Verständigung mit dem Ostblock am Herzen. Überaus gute Beziehungen hat er zum Mutterland des Esperanto, zu Polen. Der polnische Rundfunk bringt regelmäßige Esperanto-Sendungen. Mit dem Versenden seiner „Revuo“ hat Pickel manchmal Schwierigkeiten: In der DDR und in der CSSR wird sie grundsätzlich beschlagnahmt; in der UdSSR hängt das vom Inhalt ab. In der letzten

Nummer steht eine Satire von Kishon. „Die wird wohl nicht durchgehen“, fürchtet Pickel.

Auf der ganzen Welt sprechen etwa eine Million Menschen Esperanto, jene von dem polnischen Augenarzt Zamenhof Ende des vorigen Jahrhunderts künstlich geschaffene Sprache. Sie verfügt über rund 80 000 Wörter und basiert auf 16 grammatikalischen Grundregeln. Jeder, der sich intensiv damit beschäftigt, beherrscht Esperanto innerhalb von sechs Monaten. Ludwig Pickel hat bereits mit zwölf Jahren durch einen Bekannten seiner Familie Esperanto gelernt. Seit 1960 ist der geborene Altdorfer selbständig und gibt neben der „Revuo“ die „Pilo-Press“ heraus, eine Art Pressedienst in Esperanto. Beide Blätter werden in der ganzen Welt gelesen. Pickel vertreibt außerdem Lehrbücher und Esperanto-Literatur. In der Nürnberger Volkshochschule kann man seit drei Jahren Esperanto lernen. In Niedersachsen läuft zur Zeit ein Versuch an einer Grundschule mit Esperanto als Unterrichtsfach — ein bescheidener Anfang.

Esperantisten kommen auf dem

Estimata amiko Ludwig Pickel



Ludwig Pickel mit seiner „Esperanto-Revuo“. Ein Chinese nennt ihn auf Esperanto estimata amiko, geschätzter Freund. Foto: Hatenrichter

ganzen Erdball (außer in Afrika, wo Esperanto nicht verbreitet ist) nicht in Verlegenheit. Reisende blättern im „Jarlibro“ (Jahrbuch) des Esperanto-Weltbundes nach, suchen sich die Adressen Gleichgesinnter heraus und nehmen Kontakt auf, ob in Australien, der UdSSR oder in den USA: Esperanto kennt keine Grenzen!

Esperanto will den Muttersprachen keine Konkurrenz machen. Im Gegenteil: Es trägt sogar zum Erhalt

von Muttersprachen und Minderheiten bei. Pickel zitiert Michl Erbauers Gedicht „Alle Bayern mögen Esperanto“: A neue Einheitssprachmaß her; / Dann kimmt der Preiß mit Bayern zsamm / Und aa der Russ' mit Amsterdam / Europa mit Amerika / Und Asien mit Afrika / Da hörat ma die Weltnachrichten / Und mancher Streitfall waar zum Schlichten / Dahoam redt jeder — des bleibt gwiß / Wie eahm der Schnäbel gwachsen ist!“

Doris Losch